

# ESPERANTO-LANDO

III - a jaro.

Junio - Aŭgusto 1932.

N - ro 12.

“Ni ŝategu veron pro vero mem, kaj ni klopodu senpartie trovi kaj ricevi la veron por si mem, kaj sciigu la veron al aliaj.” Benjamin Franklin.

“Toler-avido kaj kunlaborado por la Tuta Homaro.”

ĈEFREDAKTORO: [Editor] JOHN BOVIT.  
KUN REDAKTORO: GEORGO SAVILLE.  
FONDINTO: STANLEY PELK.  
Ĉefkunlaboranto: FRANK S. TEMPLIN.

ESPERANTO - LANDO (kvaronjara)  
10 cendojn aŭ .50 svis. frk. unu numero  
25 cendojn aŭ 1.25 svis. frk. tutjara abono.  
1 dolaron aŭ 5. svis frk. 5-jara abono.  
Pagebla per respondkupoj, aŭ per moneroj.  
Reakcio kaj Administracio: 414 Springfield  
Avenue, Summit, N. J. Usono.

ESPERANTO - LAND is published by  
Universal Esperanto Fraternity, Inc., 574  
Jersey Avenue, Jersey City, New Jersey,  
U.S.A. Published quarterly, 10 cents a copy,  
25 cents a year, \$ . for 5 years.

## LA KVARON - JARO.

Negocado Privata 1aj la Registaro.

USONAJ KORTUM-DECIDOJ GRAVEGAJ.

New State Ice Company kontraŭ Ernest A. Liebmann. 52-a libro de Usona Superega Kortumo - Raĵortanto, paĝo 371.

Decidiĝe 21-an de Marto, 1932.

La Fajtoj: Laŭ la leĝo de la ŝtato Oklahoma, la New State Ice Company (La Nova Ŝtata Glacio - Kompanio) obtenis ateston de oportuneo kaj neceso publika de la ŝtato por fabriki glacion. La kompanio investis \$500,000. por konstrui fabrikon por tiu celo. Ĝi jam fabrikis glacion dum kelkaj jaroj.

Liebmann aĉetis grundon kaj komencis konstrui fabrikon por fabriki glacion. Li nek petis nek obtenis ateston de oportuneo kaj neceso publika por tion fari. La Nova Ŝtata Glacio-Kompanio komencis proceson por haltigi Liebmann en lia intenco.

Liebmann argumentis, ke la fabrikado de glacio ne estas publika sed privata negoco, ke iaŭ la 14-a amendo de la konstitucio usona, kiu parte diras, “Neniu ŝtato alprenu aŭ efektivigu iun leĝon, kiu malpligos la privilegiojn aŭ la imunecojn de civitanoj de Usono”, li havis la rajton partopreni en iu metio aŭ negoco. Se tiu rajto, fabriki glacion, dependas je la decido de oportuneo kaj neceso publika, donita de komisiono de la ŝtata registaro, la ŝtato senigas lin de lia rajto konstitucia.

Du malsuperaj kortumoj subtenis la argumentojn de Liebmann. La Kompanio apelaciis al la Superega Kortumo de Usono.

Sinjoro Juĝisto Sutherland donis la opinion

de la kortumo:

“...Ne estas necese disputi la rajton de la ŝtato alpreni leĝojn por eksperimenti en ekonomiaj aferoj, sed estas stranga regulo permesi la rompon de limigoj, kiujn la konstitucio usona metas sur la ŝtaton... La principo estas parto de nia sistemo konstitucia, ke estas certaj esencoj de libereco, kiujn la ŝtato ne povas forigi por eksperimenti... Ŝtato ne povas arbitre malhelpi negocojn privatajn, nek malpermesi, nek mallogike limigi metiojn leĝajn.

“Leĝo. (1) kiu malpermesas la donon de permeso por fabriki, vendi, aŭ disdoni glacion, escepte kiam oni pruvis, ke tiu industrio estas publika neceso, (2) kiu rajtigas la neigon de permeso, kie estas sufiĉaj fabrikoj permesitaj, estas nula, ĉar tiu leĝo mallogike malhelpas negocojn privatajn... Liebmann havas la rajton fabriki glacion sen atesto de oportuneo kaj neceso publika de pliaj fabrikoj por tiu industrio.”

Sinjoro Juĝisto Louis D. Brandeis nekonsentante:

“... La popolo de Usono nun travivas krizon, kiu estas pli grava ol milito. Oni sentegas mankon de necesaj en tempo kiam ne mankas necesaj, sed en la tempo kiam ni havas abundegon de necesaj kaj luksaj. La longdaŭra krizo ekonomia enkondukis (1) senlaborecon, neniam antaŭe viditan, (2) falegon de prezoj da varoj, kaj (3) perdoj ekonomiaj, kiuj minacas la vivon de niaj institucioj financaj. Iuj kredas, ke la nunaj kondiĉoj minacas eĉ la fundamenton de la sistemo kapitalista.

“Ekonomiistoj serĉas la kaŭzojn de la malordo kaj reekzamenadas la bazojn de nia strukturo industria. Negocistoj serĉas por plibonigoj. La plej multo da ili komprenas ke la malsukceso disdonegi vaste la profitojn de industrio estas la gravega kaŭzo de nia nuna malfacila egajo. Sed vere aŭ malvere, personoj pensas ke unu el la gravegaj kaŭzoj estas senkontrolita konkuro.”

“Pli kaj pli, oni esprimas dubon, ĉu estas saĝe ekonomie, aŭ juste morale, ke la ŝtato permesu, ke oni aldonu fabrikojn al industrio, kiu jam havas pli fabrikojn ol la industrio bezonas por provizi la konsumadon de la popolo. Por pruvi tiun dubon, oni montras, ke ni havas pliajn fabrikojn ol ni bezonas, ĉar oni konstruis pliajn fabrikojn sen responda pliiĝo de la kapableco de la popolo por konsumi la produktojn. Oni diras, ke pro metodoj plibonigaj de fabrikado, ebligita de eltrovoj en scienco, inventado, kaj granda amasigo de kapitalo, niaj industrioj kapablas provizi de 30 ĝis 100 procentoj pli ol kion oni eluzas eĉ en la tagoj de prospero pri kiu ni fanfaronas, kaj la nuna kapablo por provizi, dum longa tempo, superos la bezonojn de negocado. Esperantigis John Bovit.

(Daŭrigita sur paĝo 105)

SCIENCO.

Majo 2: Doktoroj J. D. Cockroft kaj E. T. S. Walton de Cambridge Universitato rompigis la atomon. Tio estas la celo, kiun fizikistoj klopodis efektiviĝi dum multaj jaroj. Ili rompigis la atomojn de hidrogeno per voltaro de 120.000, kaj la atomoj rompiĝis en heliumo kun 100 ĝis 160 obloj da energio, kiun ili uzis en la procedo. Tiuj eksperimentoj ankoraŭ donis nenion, kion oni povas uzi por komercaj aferoj.

23-a ROTARIA KONFERENCO INTERNACIA

Junio 20 - 24: Proksimume 5,150 rotarianoj de la diversaj nacioj kunvenis en Seattle, Washington, kiu estas belega urbo, ĉirkaŭita de neĝkovritaj montoj, el kiuj Ranier estas la plej alta monto. Ĝia alto estas 4.3 kilometrojn. Oni nomas tiun konferencon, la Domo de Amikeco. La sesa celo de Rotario estas internacia amikeco. Prezidanto Sydney W. Pascal, fabrikanto de kando en Londono, malfermis la konferencon. Inter la rezolucioj, kiujn oni alprenis, estas la rezolucio, ke rotarianoj kie individuoj pli interesiĝu sin en aferoj publikaj.

Samideano Derrel Beard, la usona reprezentanto en la Rotaria Esperanto-Amikaro, reprezentis la klubon en Napa, California. Samideano Gilbert Nickel reprezentis la klubon en Middletown, Delaware. Samideano Henry W. Fisher reprezentis la klubon en Perth Amboy, New Jersey. S-no Beard paroladis pri "Esperanto kiel Helpa Lingvo." La direktoroj de Rotario Internacia sugestis kaj konsilis, ke rotariaj kluboj diskutu almenaŭ unufoje jare la temon pri help-lingvo. Rotarianoj interesiĝas pli kaj pli en Esperanto.

S-anoj Beard, Fisher, kaj Nickel vizitis la kunvenon de la Seattle Esperanto-Klubo. S-ano Jackson estas la fondinto de tiu klubo, kiu nun havas pli ol cent membrojn. Ili havas ĉambregon kaj libron.

Iom da tempo antaŭe, la klubo en Perth Amboy prezentis rezolucion al Rotaria Konferenco Internacia, ke Rotario uzu Esperanton dum la internaciaj kunvenoj. Aliaj kluboj faris similajn proponojn.

La konferenco elektis Clinton P. Anderson de Albuquerque, New Mexico, prezidanton de Rotario Internacia por la venonta jaro.

La Pac-Movado Usona.

Feb. 17 La Ligo de Nacioj Asocio rekomendas la subskribon de la Lowell-Baker petskribo: "Ke la Prezidanto kaj Kongreso certigu al la ligo de Nacioj, ke Usono konkordos en ia plano ekonomia, kiun la Ligo decidis por restarigi pacon inter Japanujo kaj Ĥinujo."

[ Daŭrigita sur paĝo 95. ]

**OOMOTO,**

Komence de Julio nia gazeto, OOMOTO, aperos sur 84 paĝoj kun interesa enhavo.

Konstantaj kolonoj pri Japanujo, Vojaĝoj, Literaturo, kaj Filozofio.

Senpartiaj recenzoj, belaj ilustraĵoj, konstanta progreso.

Ni bezonas vian abonon kaj kunlaboradon!

Petu senpagan specimenon. OOMOTO, Kameoka (Kioto—hu) Japanujo.

## ESPERANTO HOUSE IN HOLLAND.

The city government of Arnhem, Holland, presented to the Che Institute a building in a park. Golden letters, Esperanto House, over the entrance welcomes the visitors. At the various floors the Esperanto words for sitting room, salono, class room, kursejo, restaurant, restoracio, designate the various rooms. In the halls there is flowing cold and warm water. Upon the walls in the bed rooms hang tables of rates and hotel information in the Esperanto language.

Joyfully sounds the Esperanto language in the vestibules, upon the stairs, and even upon the roof that has modern sun baths. Esperantists of various mother tongues gathered there during the Easter week to discuss language questions. Later, students came to attend university lectures in the Esperanto language.

Mrs. Isbrucker and Mr. Andreo Chejare are in charge of the Esperanto House.

Edmont Privat in 1932 May Esperanto 77.

### PROGRESS OF ESPERANTO.

The minister of the Post office and Telegraph in Chechoslovakia, on October 26, 1931, permitted the use of Esperanto, as a clear language for radio use on short waves.

In 1931, the following guide books and guide folders were issued in Esperanto: Viena Linz (Austria.) Varna (Bulgaria). Lame Nelorad (C S R). Tallin (Estonia). Cannes (France). Lovenberg [Germany]. Dotrecht [Holland]. Milan and Lombardy Lakes [Italy]. Japan, issued by the minister of railroads. Lulljana [Jugoslavia]. Latvia, issued by the minister of foreign affairs. Lichtenstein. Zakopone [Poland]. Visby [Sweden]. Upper Silezia. Laponia. Nordermey.

The city of Viroflag in France named one of its streets, Esperanto street.

Lichtenstein issued a postage stamp with German and Esperanto inscriptions.

In Holland, Esperanto was officially added to the language courses in the commercial schools.

The French section of the International League of Women for Peace and Freedom printed stamps to call attention to the duty of disarmament. The stamps are printed in German, English, French, and Esperanto languages. 42 stamps are sold for 4 French franks by S-ino Borel, 1 Quai Claude Bernard, Lyon, France. The leaders of the French section of the League favor Esperanto. They are endeavoring to introduce it into their own organization. They are endeavoring to arrange an international summer course in the Esperanto language only in 1933.

*Johm Povit*

<p>ESPERANTO BOOKS of all PUBLISHERS at Rand Book Store, 7 E. 15th Str., New York City, and at New York Public library, Room 315, daily and Sunday, on 42nd Street between 5th and 6th Avenues, New York City.</p>	<p>ESPERANTO CLUB HARMONIO holds outings the Third Sunday of the month during the Summer. For more information apply to Berthold Schmidt, 12 E. 41st Str., New York City.</p>
--	---

## LA SFERO DE LIBROJ THE SPHERE OF BOOKS

*La redakcio tre volonte publikigas kontraŭopiniojn, koncerne kiun ajn aperintan recenzon, La libroj, ĉi tie menciataj kaj recenzataj, estas haveblaj ĉe la librofako de nia eldonejo.*

KAZIMIERZ SMOGOREWSKI, Pol-Pomeranio. El la franca lingvo tradukis S. Grenkamp-Kornfeld. Kun 22 kartoj entekste kaj 4 plurkoloraj ekster tekste. 1931. 136 paĝoj. 25 X 17 cm. Broŝurita. Prezo 60 cendojn.

Pro liaj laboroj en la sfero de ekstera politiko, Kazimiro Smogorzewski, la aŭtoro, estis ordenita per Honora Legio (Francujo), Komandoro de Sankta Sava (Jugoslavio), Polonia Restituta (Polujo).

La libro pritraktas la limon germanan-polan. Ĉu Pol-Pomeranio, kies loĝantaro estas nun 91% de pola gento restu kun Pollando, aŭ ĉu tiu land-parto estu redonata al Germanujo?

La aŭtoro konstatas, ke de historiajn, moralajn, kaj ekonomiajn kialojn, Pol-Pomeranio devas aparteni al Pollando.

Kanceliero Von Papen de Germanujo ĉe la Lausanne Konferenco rilate inter registeraj ŝuldoj, parto-prenita de 13 eŭropaj registaroj, dum la lasta semajno en junio 1932, insistis, ke la germana-pola limoj estu ĝustigitaj kaj la pola koridoro estu redonata al Germanujo.

S. Grenkamp-Kornfeld per lia sperta esperantigo de tiu verko helpas nin juĝi la vidpunktojn de Smogorzewski kaj Von Papen. *John Bovit.*

"Scienca Gazeto". Dumonata gazeto popularscienca pri diversaj temoj. Formato 23 X 15 cm., kaj ĉiu kajero enhavas 16 dense presitajn paĝojn krom la kovrilo. Ĝi komenciĝas per sia No 1, Januaro-Februaro 1932. Redaktoro Karl Froding.

La redaktoron, Karl Froding, oni ne plu devas prezenti al la malnova esperantistaro. Li estis lerta esperantisto jam antaŭ multaj el ni eĉ pensis pri la uzebleco de l'mondlingvo. Antaŭ multaj jaroj li estis tradukinta la bone konatan kaj amatan noveleton de Jack London, "Le Forto de la Fortaj", kun permeso de la tiam vivanta kaj Esperanton aprobanta aŭtoro. Antaŭ 16 jaroj Froding estis unue ekprovinta mem eldoni kaj mem presi esperant'lingvan gazeton; se li fine malsukcesis, tio ne okazis pro lia kulpo sed pro nesufiĉa apogo flanke de l' Usona esperantistaro.

"Scienca Gazeto", tamen, montriĝas ke la antaŭaj senlacaj penoj de ties redaktoro ne nur ne estis senfruktaj sed ke ili akiris sperton kiu povas rivali, sur egala nivelo, kun la plej eminentaj redaktoroj Eŭropaj. La lingvo-stilo estas, tuj ĉe la komenco, sperte kontrolata kaj la preseraroj estas tre maloftaj.

Mi notis nur kelkajn malgravaĵojn en la No 1 kaj nenion en la Noj 2 kaj 3. Anstataŭ "Skribu Sciencajn Verkojn Esperante" mi dirus "Verku Sciencajn Verkojn (au Librojn) Esperant'lingve. La propagando, en la sama artikolo, por uzo de Esperanto flanke de l'sciencistoj, estus trafa nur en naciaj lingvoj. Esperantistoj, kiuj povas legi tiun artikolon, estas jam konvinkitaj pri la taŭgeco de Esperanto. Ĉiuj stilisoj dirus "Ŝtona Landkarto Antikva Helpas al Antikvistoj", anstataŭ "..... Helpas Antikvistojn".

Georgo Saville

# LA RILATO DE USONO AL ĤINUJO.

## The Position of United States To China.

24-an de Februaro, 1932.

Estimata Senatoro Borah:

La naŭ potenca traktato, kiel vi kompreneble scias, formas la leĝan bazon sur kiu sin nun apogas la "malferma pordo" plano rilate al Ĥinujo. Tiu plano, elparolita de John Hay in 1899, ĉesigis la barakton inter la diversaj potencoj por la tiel-nomitaĵ sferoj de intereso en Ĥinujo, kiu minacis la disigon de tiu lando.

Por plenumi tiun ĉi, S-ro Hays envokis du principojn. (1) la egalecon de la komercaj ŝancoj inter la nacioj negocante kun Ĥinujo, kaj (2) kiel neceso ai tiu egaleco, la konservadon de la landa kaj administra tuteco de Ĥinujo....

Dum dudek jarojn post tio, la "malferma pordo" plano apogis sin sur neformalaj deklaroj de la diversaj potencoj. Sed dum la vintro de 1921-22 ĉe konferenco en kiu partoprenis ĉiuj el la ĉefaj potencoj, kiuj posedis interesojn en la Pacifiko, la plano kristaliĝis en la tiel nomita naŭ potenca traktato, kiu donis precizecon al la principoj sur kiu la plano sin apogis.

### Terminoj de la Traktato.

En la unua artikolo de la traktato, la kontraktantaj potencoj escepte Ĥinujo, konsentis:

1. Respekti la sendependecon, la landan kaj administran tutecon de Ĥinujo.
2. Provizi la plej plenan kaj plej senembarasan ŝancon al Ĥinujo por disvolvi kaj konservi por si mem efikan kaj daŭreman registaron.
3. Uzi ilian influon por efektivi, starigi, kaj subteni la principon de egala ŝanco en komero kaj industrio por ĉiuj nacioj tra tuta Ĥinujo.
4. Deteni sin preni avantaĝon pro kondiĉoj en Ĥinujo por serĉi apartajn rajtojn aŭ privilegiojn, kiuj malgrandigu la rajtojn de regatoj aŭ civitanoj de amikemaj ŝtatoj, kaj ne permesi agojn danĝerajn al la sekureco de tiuj ŝtatoj....

La traktato estis originale subskribita de Usono, Belgujo, Britujo, Ĥinujo, Francujo Italujo, Japanujo, Nederlando, kaj Portugalujo. Poste ŝi estis ankaŭ subskribita de Norvegujo, Bolivio, Svedujo, Danujo, Meksikio, Germanio.  
(Daŭrigita sur paĝo 92)

### CURRENT HISTORY

CURRENT HISTORY MAGAZINE provides a true and vivid presentation of the whole world as it is, now, and what is going on all over the world and how the people of the world think.

Published monthly. 25 cents a copy. \$3.00 a year. Times Square, New York City.

# ARABA NOKTO ĈE MADISON PLACO

de O. Henry

## Usono 1862 - 1910.

el angla tradukis Georgo Saville.

Al Carson Chalmers en lia apartamento apud la placo, Phillips alportis la vesperan poŝtaĵon. Krom la ordinara korespondaĵo troviĝis en ĝi du leteroj kun samspeca poŝtmarko alilanda.

Unu el la alvenintaj leteroj entenis fotografajon de virino. La alia entenis nedifineblan leteron, je kiu Chalmers longatempe absorbiĝis. La letero estis de alia virino; kaj ĝi kvazaŭ enhavis venenitajn repintojn, kiuj estis dolĉe en mielo trempitaj kaj plum-kovritaj de subsugestoj kiuj koncernis la fotografitan virinon.

Chalmers forŝiris tiun leteron je mil eroj kaj komencis eluzi sian altprezan tapiŝon paŝegante sur ĝi tien kaj reen. Tiamaniere besto el ĵangalo agas kiam ajn oni enkaĝis ĝin, kaj sammaniere homo agas kiam ajn li estas enloĝigita en ĵangalo de dubo.

Post kelka tempo la malripoza humor-stato estis venkita. La tapiŝo ne estis ensorĉita. Dek-ses futojn oni povis vojaĝi laŭ ties longeco - transporti onin tri-mil mejlojn trans la oceanon estis ekster ĝia povo.

Phillips aperis. Li neniam eniris. Kvazaŭ bone oleita ĝenio \* 1) li ĉiam aperis.

"Ĉu vi tagmanĝos ĉi tie, Sro., aŭ aliloke?" li demandis.

"Ĉi tie," respondis Chalmers, "kaj en daŭro de duonhor." Li malgaje aŭskultis al la januara blovego kiu transformis la malplenan straton je eolia \* 2) trombono.

"Atendu," li diris al la malaperanta ĝenio. "Kiam mi estis hejmen iranta trans la placo mi ekvidis multajn homojn tie kiuj estis vicestrantaj. Sur io levita, staris iu kiu estis paroladanta. Kial staras tiuj homoj en vico kaj kial estas ili tie?"

"Ili estas senhejmaj homoj, Sro.," respondis Phillips. "La homo staranta sur la kesto penas akiri loĝejojn por ili por la nokto. Venas personoj por aŭskulti kaj donas al li monon. Poste li sendas, tiun nombron por kiu la mono pagus, al iu loĝej-domaĉo. Pro tio ili estas vicestartantaj; ĉiu estas laŭvice al lito sendata."

"Je la tempo kiam la tagmanĝo estos servata," diris Chalmers, "venigu unu el tiuj bonuloj ĉi tien. Li tagmanĝos kun mi."

"K-k-iun -," komencis Phillips, ekbalbutante la unuan fojon dum sia longjara servada.

"Elektu iun sencele," diris Chalmers. "Vi povas zorgi ke li estu sufiĉe malebria - nek estu li kulpigata pro ioma grado da pureco. Jen ĉio."

### WORLD UNITY.

*World Unity Magazine has become the recognized source of world news, not journalistic reports of physical events but impartial interpretations of the world movement in its moral and intellectual reality.*

*A complimentary copy will be sent you on request.*

*Published monthly. 25 cents a copy \$2.50 a year.*

*4 East 12th Street, New York City.*

Ne kutime ludis Carson Chalmers la rolon de kalifo. Sed tiuvespere li sentis la malefikecon de konvenaj iloj kontraŭ melankolio. Ion voluptan kaj elstaraĉan, ion altgustan kaj araban, li devas havi por faciligi sian melankolian humoron.

Ĵus post duonhoro Phillips finis sian deĵoron kiel sklavo de la lampo.

La kelneroj el la malsupra restoracio ekbalancis supren la plezurigan manĝon. La manĝo tablo, pretegitata por du personoj, ardis gaje en la ardo de la rozkolor-ombritaj kandeloj.

Kaj tiam Phillips, kvazaŭ enkondukante kardinalon - aŭ gardante domrabiston - envenigis la tremantan gaston kiu estis forkondukita el la vico de almozuloj.

Oni kutime nomas tiajn homojn ruituloj; se la komparo estu uzata ĉi tie ĝi estas kvazaŭ difino de forlasitaĵo kiu estis de fajro detruita. Eĉ ankoraŭ iu brulo flagretanta lumigis la korpon drivantan. Liaj manoj kaj vizaĝo estis antaŭ-nelonge lavitaj - rito al kiu Phillips insistis kiel memoraĵo por la difektita konveneco. En la kandel-lumo li staris kvazaŭ makulo en la decaj fiksaĵoj de la apartamento. Lia vizaĝo estis malsan-blanka, kaj ĝi estis preskaŭ ĝis la okuloj kovrita de stoplo kiu havis la nuancon de ruĝa felo kian la montro-hundoj irlandaj posedas. La kombilo de Phillips malsukcesis ordigi la palbrunajn harojn, kiuj jam de longe matumiĝis kaj konformiĝis al la konturo de konstante portata ĉapelo. Liaj okuloj estis plenplenaj da preterespe- ra, artifika defio kian oni povas vidi je hundaĉo mistraktata de turmentantoj. Lia malfreŝa jako estis alten butonumita, nur kvaron-colo da kompensa kol-umo montriĝis super ĝi. Lia konduto estis escepte senembarasa kiam Chalmers ekstaris trans la ronda manĝotablo.

"Se vi faros komplezon al mi," diris la gastiganto, "mi estos felica ĝui vian kuneston ĉe tagmanĝo."

"Mia nomo estas Plumer," diris la gasto el la ĉefvojo, per severa kaj atakema voĉtono. "Se vi sentus kiel mi, vi dezirus ekscii la nomon de persono kun kiu vi estas manĝonta."

"Mi estis dironta," daŭrigis Chalmers iom rapide, "ke mia estas Chalmers. Ĉu vi sidiĝos alfronte?"

Plumer, de la kunkolektita plumaro \*3), fleksis siajn genuojn por ke Phillips povu submeti la seĝon sub li. Lia mieno montris ke li sidadis ĉe servataj manĝotabloj antaŭe. Phillips surmetis la anĉovojn kaj olivojn.

"Bone!" kvazaŭ ekbojis Plumer, "laŭ servico, ĉu ne? Tre bone, mia gajega reganto de Bagdad. Mi estos via Scheheresade dum la tuta vojo ĝis kiam ni atingos la dent pinglojn (4). Vi estas la unua kalifo kiun mi renkontis de post kiam ekfostiĝis, kiu posedas malfalsan guston orientan. Kia felico! Mi estis la kvardek-tria en la vico. Mi finis kalkuli, ĵus kiam via bonvena

[ Daŭrigita sur paĝo 102 ]

## REVIEW OF REVIEWS

Progress of the World. History in the Making. Cartoons of the Month.  
Articles on Issues of To-Day. Most Important Articles in Other Magazines.  
Industry. Published monthly. 25 cents a copy. \$3.00 a year.  
55 Fifth Avenue, New York City.

[ Daŭrigita de paĝo 89. ]

nujo subskribis ĝin, sed ŝia parlamento ĝin ankoraŭ ne konfirmis. Oni devas memori, ankaŭ, ke tiu ĉi traktato estis unu el kelkaj traktatoj akceptitaj en la konferenco ĉe Washington de la diversaj koncernaj potencoj. Ĉiuj traktatoj estis interrilataj kaj interdependaj . . .

Ses jarojn poste, la plano de mem-neigado, la ne atakado de pli fortaj kontraŭ plimalfortaj potencoj, sur kiu la naŭ potenca traktato estis bazita, ricevis plifortigon per la subskribo de preskaŭ ĉiuj nacioj de la mondo de la traktato de Paris, la tielnomita Kellog-Briand traktato.

Tiuj ĉi du traktatoj reprezentas sendependajn, tamen, harmoniajn paŝojn prenitajn por la celo akordigi la konsciencojn kaj la publikan opinion de la mondo favorema al sistemo de la orda disvolvo per la Leĝo de Nacioj, enhavante en si la solvon de ĉiuj malakordoj per metodoj de justeco kaj paco, anstataŭ laŭ senleĝa perforto. La programo por la protekto de Ĥinujo de la ekstera atako estas esenca parto de ia tia disvolvo. La subskribintoj kaj aliĝintoj de la naŭ potenca traktato prave sentis, ke la orda kaj paca disvolvo de la 400 000 000 loĝantoj en Ĥinujo estis necesa al la paca bonfarto de la tuta mondo, kaj ke neniu programo por la bonfarto de la mondo entute, povus malzorgi la bonfarton kaj protekton de Ĥinujo.

La nunaj okazoj en Ĥinujo, speciale la malamikaĵojn, kiujn oni ekkomencis en Manĉurio kaj poste oni etendis al Shanghai tute ne indikas la konsilindon de iu ŝanĝo en la traktatoj, kiujn ni pridiskutas. Tiuj ĉi okazoj parolas al ni, ke ni fideme plenumu la interkonsentojn en la traktatoj rilate al ĉiuj nacioj, kiuj havas interesojn en la malproksima oriento . . .

Je januaro 7, 1932, laŭ la instrukcioj de la Prezidanto, tiu ĉi registaro formale sciigis Japanujon kaj Ĥinujon, ke ĝi ne rekonas ian situacion, traktaton aŭ interkonsenton eniritan de tiuj ĉi registaroj kontraŭe al la interkonsentoj de tiuj ĉi traktatoj, kiuj efikis la rajtojn de nia registaro aŭ ties civitanoj en Ĥinujo . . .

Tre sincere via,

Henry L. Stimson

Sekretario de Ŝtato de Usono.

*Esperantigis Julia Goldzier.*

Ho Rotario! de C. Warner. (Usono)

Ekzistas Klub' en kiu loĝas paco kaj fratam!

Rideto kaj manpremo servas kiel vivbalzam'.

La membroj elektitaj devas agi kun fervor'

Kaj dramon rotarian ankaŭ ludi per tutkor'!

Ho Rotari! Ho Rotari! Jen estas' mot' por vi.

Servemo, fideleco ja nin profitigas pli.

Ho Rotari! Prediku vi pri fido, am' kaj ĝu'

Bonagoj ekbriligas supre en la ĉielblu'.

Tradukis Henry W. Fisher kaj B. W. Reich.

## THE WORLD TOMORROW

A Journal Looking Toward a Social Order Based on the Religion of Jesus.

Published monthly. 25 cents a copy. \$2.00 a year.

52 Vanderbilt Avenue, New York City.

Will Become Early in September a WEEKLY Publication.



## La Advokato, Lia Jura, Ekonomia, kaj Socia Situacio en Usono.

de John Bovit.

Jura Situacio

Antaŭ oni fariĝas advokato, oni studas 12 jarojn en la urba lernejo, 5 jarojn, en kolegio, kaj oni devas esti sukcesa en la ekzameno donita de la ŝtata kortumo. Tiam la kandidato ĵuras publike, inter alie, ke li "plenumos sian oficon laŭ sia plej bona kapablo kaj kompreno. Tiel helpu min, Dio." La guberniestro donas al li diplomon, nomante lin advokaton.

Ĉiu persono povas paroli por si mem en la kortumo, sed nur advokato povas paroli kiel agento por alia persono en la kortumo.

Estas neleĝe paroli false rilate la konduton de iu persono. Sed advokato havas la rajton paroli vere aŭ false pri la konduto de persono, kondiĉe ke (1) li parolas en kortuma kunveno; (2) li parolas kiel agento de persono, kiu estas interesita en la proceso; kaj (3) lia parolo rilatitas al la temo konsiderita. Jene: Rogers estis kandidato por fariĝi kuratoro al kreditoroj en bankropta proceso. La advokato, agante por kelkaj kreditoroj, diris al la juĝisto, "Rogers ne estas konvena viro. Li ne estas honesta." Pro tiu diraĵo la juĝisto rifuzis aprobi la elekton de Rogers kaj la kreditoroj elektis aliulon. Rogers komencis proceson por obteni pun-monon de la advokato. La decido estis, pro la kialoj cititaj, ke la advokato ne estas responda en pun-mono. Rogers kontraŭ; Thompson, 89-a libro de New Jersey Law Raportoj, paĝo 639. [Jaro 1916]

Advokato ne povas disdoni la sekretojn de sia kliento. Tio neigas, ke la advokato akceptu taskon de alia persono, kiu tasko rilatitas al sekretoj de antaŭaj klientoj.

La kortumo, la juĝisto, la advokato estas nur nomoj de homaj institucioj, de karakteroj homaj. Edukado kaj kulturo plibonigas nur malmultajn homojn. La homajn virtojn kaj malvirtojn, kiujn oni vidas en aliaj medioj de la vivo, oni ankaŭ trovas en la kortumo, inter la juĝistoj, kaj advokatoj.

### La Ekonomia Situacio.

Advokato estas mirinda profesio por persono, kiu estas sendependa finance, aŭ por la persono, kiu havas aregon de amikoj kaj konatoj en rondoj, sociaj, negocaj, kaj politikaj. Sed advokato estas malĝoja kaj malriĉa profesio por persono, kiu havas malriĉajn rimedojn kaj havas nur kelkajn amikojn kaj konatojn, Tio estas la sorto, pli malpli, de aliaj metioj, negocoj, kaj profesioj.

### Socia Situacio.

Merito, talanto, scio ne donas eminentan socian situacion al la advokato. Lia ekonomia stato difinas sian socian situacion.

LONDON: Fera Kalkanumo. El la angla originalo tradukis George Saville. 362 paĝoj Bindita. \$1.10  
Sennacieca Asocio Tutmonda, Kolmstrasse 1, Leipzig, 027, Germanujo. aŭ Esperanto-Lando.

Goethe, J. W. von: Hermano kaj Doroteo. Eposo idilia. El la germana originalo tradukis B. Kuster. 77 paĝaj. Kartonita 35 cendojn Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig, C 1, Salomonstrasse 15, Germanujo. aŭ Esperanto — Lando.

## NEGOCA SITUACIO.

Negoca Situacio en Usono Resumita de Departementoj de la Registaro de Usono kaj de aliaj Aŭtoritatoj. Mezo 1923 - 5 estas 100 procentoj. Arangis John Bovit.

1932

"Negoc - Semajno" indekso de meza

Februaro Marto Aprilo

		Februaro	Marto	Aprilo
aktiveco negoca		59	57	56
Silko uzita (pakoj)		n	46,761	35,779
Kotono kruda, uzita en fabrikejoj (pakoj)		n 450,018	488,655	367,280
Konstruaj - Kontraktoj, en milionoj da dolaroj				
(A) Ĉiuj specoj		89	112	122
(b) Hejmaj		24	33	28
Eksportado, en milionoj da dolaroj		153	155	135
Importado, en milionoj da dolaroj		131	131	126
Importado de kafo, en miloj da sakoj		1,149	1,220	793
Importado de kruda sukero, en miloj da tunoj longaj		437	515	510
Okupigo en 89 fabrikaj industrioj		p 65	64	62
Salajro en 89 fabrikaj industrioj		p 49	48	44
Okupigo en 12 ne-fabrikaj industrioj		p 69	68	68
Salajro en 12 ne-fabrikaj industrioj		p 59	58	57
Laboraj disputoj je la komenco de la monato		n 50	54 a	67 a
Laboruloj kiuj partio - prenis		n 31,140	32,386 a	18,950 a
Kosto de vivo		p 80	79	78
Prezo de tritiko po buŝelo, ĉiuj specoj,		s 59	58	60
Akciaj prezoj, 50 New York Times		\$ 74	\$70	\$52
Obligaciaj prezoj, 50 hejmaj		82	80	79
Bank debetoj en milionoj da dolaroj				
(A) en Nov - Jork Urbo		14,381	16,160	15,558
(B) Ekstere Nov - Jork Urbo		12,870	13,729	14,366
Bankrotaj		n 2,732	2,951	2'816
Pasivoj ĝiaj en miloj da dolaroj		84,900	93,760	101069
Bankaj ĉesigoj, aliĝitaj al Federal Reserve		n 29	7	10
Deponoj ĝiaj en miloj da dolaroj		26,270	4,484	14,101
Bankaj ĉesigoj, ne aliĝitaj al F. R.		n 86	38	58
Deponoj ĝiaj en miloj da dolaroj		33,777	11,452	21395
Deponoj en Poŝt-ŝpara banko de usona registaro, en miloj da dolaroj		683,627	697,280	713,867
Bank - ĉekoj pagitaj, en milionoj da dolaroj			24,214	22,534
Vendado de lando kaj domoj		p 50	48	48
a, provizora.				
n, aktuala nombro.				
p, procenta mezo.				
s, aktuala sumo.				

AMERIKA ESPERANTISTO.  
News of the Esperanto Movement. The Student Page by Professor A. Kennigott. Nia Biografio and other features. Published bi-monthly. \$1. a year. 1591 Anderson Av., Fort Lee, N. J. Usono.

BILDARO LAŬ EKZERCARO  
from SPOKEN ESPERANTO for beginners. 10 copies for \$1. 100 copies for \$5. Norman W. Frost Brownfield, Maine.

## 6 HORA LABOR - TAGO KAJ 5 - TAGA LABOR - SEMAJNO.

"Ni bezonas NACIAN KOMISIONON por kolekti informadon (1) pri horoj de laboro bezonata en ĉiu industrio, (2) pri labristoj haveblaj kaj eventualaj, kaj (3) pri la faktoroj, kiuj determinas produktemon de laboristoj kune kun maŝinoj, por dividi la nombron da laborhoroj haveblaj inter la nombro da personoj, kiuj devas obteni rimedojn de la vivo per laboro." Amerika Federacio de Laboristoj. William Green. D-ro John Dewey.

5. Dum 1931, en la ĉefaj telegrafejoj la produktemo de pres-funkciistoj mezis proksimume duoble ol Morsaj funkciistoj. Tial duono da funkciistoj Morsaj senlaborigis. 1932 Marta Labor - Revuo. pago 501.

6. Ĝis la fino de 1930, 44,343 postenoj kiel gardistoj estis forigitaj pro la instalado de signaloj aŭtomataj sur stratoj trans kiu fervojoj transpasas. 1932 Aprila L. R. 757.

Feb. Sub la kondukeco de Sinjorino Corlis Lamond kaj Sinjoro William Loeb, Jr., oni organizis Bojkota Asocio Usona ĉe 218 Madison Avenuo, Nov-Jorko Urbo. La asocio diras, ke Usono aĉetas super 40 procentojn de eksportoj japanaj, kaj tiu ĉi perdo kune kun la perdo pro la bojkoto ĥina, nuligos 76 procentojn de eksportoj japanaj. Tio devigos, ke Japanujo ĉesu la militon kontraŭ Ĥinujo.

Dum partoj de Junio kaj Julio Haverfor Kolegio en Pennsylvania, la Northwestern Universitato, kaj Wellesley Kolegio havos kursojn pri internaciaj rilatoj.

"La popoloj de la mondo memoru ke, sub iliaj malkonkordoj, estas la komuna vivo al kiu ni devas donegi nian tutan aliĝecon."

John H. Randal en Majo 1932 World Unity, paĝo 76.

Rememorigaj Poŝtmarkoj Usonaj.

Ni respondas letere pri tiu temo nur al niaj abonantoj, kondiĉe ke ili sendas afrankon por la respondo.

1932 A. III Olimpaj Vintraj Ludoj, Lago Placid en Nov-Jorko. Februaro 4 - 13, 1932. Prezo de la poŝtmarko 2 cendojn: Paĝo 77 de Esperanto - Lando havas klarigon pri tiu poŝtmarko.

1932 B. 1732 Washington 1932. Havas bildon de Georgo Washington. Prezo de poŝtmarko 2 cendojn: Georgo Washington naskiĝis la 22-an de Februaro 1732. estis la generalisimo dum la revolucia milito de la 13 ŝtatoj usonaj kontraŭ Britujo ekde la 3-an de Julio, 1775 ĝis la 4-an de Decembro, 1783. Li kondukis sian armeon al venko. Oni elektis lin la unuan prezidanton de Usono. Li administris tiun oficon ekde 1789 ĝis 1797. Tiu ĉi jaro ni celebras lian 200-an naskiĝtagon. Oni nomas lin, "la patro de nia Lando."

1932 C. Arbo-Tago. 1872 - 1932. Enhavas bildon de knabo kaj knabino plantante arbon. Prezo de la poŝtmarko 2 cendojn. J. Sterling Morton de Nebraska estas la fondinto de Arbo-Tago, dum kiu tago en printempo geknaboj kaj plenaĝuloj plantas almenaŭ unu arbon. Oni celebris Arbo-Tagon unue en Aprilo 1872. Pro Arbo-Tago oni plantis milionojn da arboj en Usono. Planti arbon estas malavara ago, ĉar nur malmultaj vivas tiel longe por vidi plenaĝan arbon veni de la semo. Plantistoj havas esperon kaj fidon en la estonteco. Plantado montras, ke inter la multaj agadoj, ni devas esti utilema al la homa raso por vivi plenan vivon.

John Bovit

## LABORISTA ESPERANTO ASOCIO DE NORDA AMERIKO.

P. O. Box 101, Station K, New York City.

La Grupo New Yorke de L. E. A - N. A. kunvenas ĉiun lundon vespere ekde 8-a horo en 350 East 81st Street, New York City. Preskaŭ ĉiun dimanĉon la grupo aranĝas ekskurson al diversaj lokoj eksterurbaj. Dum la sekvanata aŭtuno ili aranĝos Esperantan kurson en Workers School. Grupoj aliĝintaj ĝis nun al LEA-NA estas en New York City, Detroit, Ĉikago, Cleveland, Perth Amboy, Montreal, Toronto, krome izelitaj membroj en 15 diversaj urboj de Norda Ameriko.

R. Bonesper, Sekretario de LEA-NA.

# BIOGRAFIETOJ.

DAVID STARR JORDAN. Gainesville, New York, 9-an de Januaro, 1871- Palo Alto, California, 19-an de Septembro, 1931. Li estis edukisto, filozofa kaj sciencisto. Lia praktika filozofio prenis la formon de energia klopodo por mond-paco, kiun li komencis longe antaŭ oni klopodis pri pac-programoj, kaj li daŭrigis tiun laboron dum la jaroj post la mond-milito. Lia kontraŭa agado milita daŭrigis ĝis la tago dum kiu Usono aliĝis la militon. Dum la milito kaj ĝis la Armistic-Tago, li donis sian plenan subtenon al la atakemaj planoj de Usono, dirante, "Mi ne ŝanĝus unu vorton, kiun mi parolis kontraŭ milito, sed tio ne plu estas la problemo. Nun ni devas aliĝi."

La 30-an de Julio, 1928, kiam li havis 77 jarojn, li diris en "ne-plu-milito" kunveno en Palo Alto, "Ĉia milito estas mortigado, rabado, kaj trompado. Ĉiu nacio perdas homojn kaj prosperon. Neniu venkas en milito."

En 1924, li obtenis la premion de 25,000 dolaroj, donitan de Raphael Hermann por sia plano por efektiviĝi la pacon de la mondo. Li verkis pli ol 12 librojn pri milito kaj paco. Li estis eks-estro de Leland Stanford Universitato en Palo Alto.

La World Unity revuo, de 12 E. 12th Str., New York City, kaj aliaj eminentuloj starigis "Monda Uniga Rememorigo" al Jordan. La celo de tiu Rememorigo estas publikigi la skribaĵojn de Jordan pri mond-paco, kaj proponi jaran premion por la plej bona traktato pri monda kunlaborado, verkita de kolegianoj.

*E. Channing Park.*

VACHEL LINDSAY. Springfield, Illinois, 10-an de Novembro, 1879 Springfield, Illinois, -5-an de Decembro, 1931. Li estas unu el la ĉefaj poetoj modernaj en Usono. Inter liaj verkoj, estas la poemo. "Lincoln Promenas Meznokte." Ĝi priskribas la Prezidanton, ĝenitan spirite per ŝtataj aferoj, marŝante la stratojn de lia urbo hejma, kaj pensante profunde. "Aventuroj Kiam Predikante la Evangelion de Belego." estas lia libro, kiu donas lian vidpunkton pri vivo. Li estis preleganto en Kolumbia Universitato.

DR-O EUGENE C. GLOVER. 1903 - Januaro, 1932. Li estis kapabla esplorinto de kancero. Li mortis pro cianida veneno, kiam eksperimentante en la Thorndike Rememoriga Scienca Laboro de la Bostona Urbo-Hospitalo. Li studadis la rilatojn de certaj grasoj, nomitaj "lipoidoj" al kancero. Transmetante cianidan solvaĵon, estas supozite, ke iom da ĝi falis sur lian manon, kiu poste tuŝis lian buŝon. Oni trovis lin senkonscia en la koridoro. Horon poste, li mortis.

*Pastor B. C. Miller.*

WHEN YOU MAKE YOUR WILL, REMEMBER ESPERANTO-LANDO FORM.

I hereby give and bequeath to the President and Trustees of The Universal Esperanto Fraternity, a corporation organized and existing under the laws of the State of New Jersey, the sum of \$ ..... in further support to publish the magazine Esperanto - Lando.

**P. Romanov:** La Mistero. Unu Horo. El la rusa originalo tradukis Isaj Dratwer. 32 paĝoj. 19 X 13 cm Brosurita. 15 cendojn. N. Szapiro, Warszawa, Nowolipki 8. Poland, aŭ Esperanto - Lando.